# Projekto **BITOTEKO**

70a Hispana Kongreso de Esperanto
Sankta Laŭrenco Eskoriala (Madrido)
1a de julio de 2011

# Bito…kio?

- **Bitoteko** = (Biblio)teko de bitoj.
- **Bito** (laŭ PIV) = 1. Mezurunuo de informacio egala al la kvanto, kiu ebligas elekton inter du eblaĵoj, k tial prezentebla per unu duuma cifero. 2. Duuma cifero (0 aŭ 1).
- **Bitoteko** = biblioteko kies dokumentoj prezentiĝas en bita formato, cifereca biblioteko.




67ª HISPANA ESPERANTO-KONGRESO
Memoria
GRUPO ESPER
BARACAL
INDIGNU!
STÉPHANE HESSEL
Tradukita el la originala franca lingvo al Esperanto
Eldona Fako Kooperativo S.A.T.
LA RONDO
Esperantista danco
Eldono de la komitato de la Vª Kongreso
Barcelono
Marvirinstrato
Originalaj Noveloj en Esperanto
Tim Westover
ELDONEJO LITERATURO.NET
L. L. Zamenhof
Esperanta proverbaro
INKO
2ª Ep. AÑO VIX N.º 47 (183) ENERO - FEBRERO 1971
Boletín
DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO
31ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO
FAMo
unuakta teatraĵo unufoja
(LA DEKunuA LOGO)
1913
JORGE HESS
SABE USTED ESPERANTO ?
CURSO PRACTICO DE LA LENGUA INTERNACIONAL
LIGA ARGENTINA DE ESPERANTO
Roger Borges / DJ
Personas de todo el mundo me envían sus canciones para que cree música para...
QUIJOTE

# Sed por tio jam ekzistas Google…

**Google ne sufiĉas!**

Jes, Google estas bon[illegible] [illegible]elpilo por orientiĝi en la reta ĥaoso, sed pensu ke:

- probable vi devus viziti plurajn retejojn por atingi la [illegible] [illegible]mentojn.
- tio perdi[illegible]s [illegible] [illegible] da tempo.
- povus esti ke via serĉo estas senrezulta ĉar:
  - la reto ne estas organizita.
  - la [illegible] mem [illegible] estas ĉiam bone indek[illegible]aj.
- [illegible] [illegible] [illegible] [illegible]o kaj [illegible] vi tempon kaj [illegible]

# Kies dokumentojn enhavos la Bitoteko?

- Depende de la sukceso de la projekto ĝi enhavos:
  - dokumentojn nur el Biblioteko Juan Régulo.
  - dokumentojn ankaŭ el aliaj iberiaj bibliotekoj kaj asocioj.
  - eble ankaŭ dokumentojn el eksteriberiaj fontoj.



# Kiajn dokumentôjn iĝi ...

- Konsiderante la ...
  - bitigitajn doku...
  - denaske bitajn dokumen...
- Konsiderante la spe...
  - Gazetojn
  - Librojn
  - Fotojn
  - Vid...
  - Son-registraĵojn
  - Gazet-eltondaîojn
  - K...
  - ...ar...t...
  - alispeca... ku...o...

Son-registraĵoj

gazet-eltondaîoj

manoj

fotoj

libroj

partitur...

gazetoj

kurioza...

videoj

# Fina celo estus, do…?

**…KONSTRUI INTER ĈIUJ** kiel eble plej **AMPLEKSAN DATUMBAZON,** kompletigante tiel la diversajn kolektojn de ĝisnunaj eldonitaĵoj.

(Tiel, iom post iom la **BITOTEKO** iĝos projekto ne plu HEF-a sed apartenanta al la tuta **ESPERANTISTARO.)**

Ni ĵetu rigardon al la strukturo:


Asocio C
Biblioteko A
Biblioteko Juan Régulo
Biblioteko B
Asocio D
Samideano X
Aliaj fontoj
BITOTEKO
Esperantistoj, reserĉistoj kaj interesatoj el la tuta mondo

# Ĉu ekzistas organizita plano?



- **1a fazo: sep. 2009 – feb. 2010**
  - Konstato de la bezono krei ĉi retservon.
  - Starigo de la unua kunlabora skipo.
  - Serĉado de taŭgaj servilo kaj mastrum-programo.
  - Skanado de la unuaj bibliotekaj dokumentoj.
- **2a fazo: feb. – dec. 2010**
  - Plua skanado de dokumentoj.
  - Testado de la programo.
  - Alŝuto kaj katalogado de la unuaj dokumentoj en la provsistemo.
- **3a fazo: 2011**
  - Pretigado kaj ekuzo de la definitiva bitoteka programo.
  - Prezentado kadre de la Hispana Esperanto-Kongreso.
  - Publikigo de la datumbazo.
  - Diskonigo de la projekto kaj invito al aliaj grupoj partopreni.
- **4a fazo: ekde 2012**
  - Redaktado de labor-protokolo por kunlaborantoj.
  - Organizado de la laboro laŭ skipoj kaj laborvojoj.
  - Fakta kaj daŭra funkciado de la Bitoteko.

# Nur scivole… kio estas farita ĝis nun?

http://bitoteko.esperanto.es

# Kio pri la teknikaĵoj kaj kostoj?

- Servilo: **1&1**
  - Internacia plene testita firmao.
  - Rekta aliro al ĉiuj ĝiaj kapabloj, eblas la instalo de ĉiaspeca baza programaro.

**600 € jare**

- Mastrumsistemo: **DSpace**
  - Libera programo.
  - Allasas ĉiajn materialojn .
  - Katalogado per *Dublin Core*.
  - *URI* (Unuforma Risurca Identigilo).
  - Tre uzata internacie en universitataj medioj.

**65 € jare**

- Libro-skanilo… aĉetota

**460 €**

- Tekstorekonilo… eble…

# Bezonatas, do, homfortoj, ĉu ne?

## Jes, prave!

La projekto bezonas homojn, kiuj laŭ siaj ebloj kaj ŝatoj kunlaboru en jenaj taskoj:

- Elektado de dokumentoj
- Skanado kaj pdf-igado de tekstoj
- Bitigado de son- kaj video-dokumentoj
- Katalogado
- Kunordigado

Kaj ĉefe, ni bezonas scii **ĉu vi jam entreprenis similan projekton** kaj ŝatus kunigi fortojn.

# Ĉu iuj jam kunlaboris?



Gazetoteko Lanti
Mirjam Walter
Lupe Sanz
Miguel Gutiérrez Adúriz
Iñaki Vélez
Katja Kapitonova
Juan Trenado
Manolo Parra
Miguel Ángel Sancho
Ana Manero

## Esperеble baldaŭ ni estos multaj pliaj!

(Mi profitas la okazon por danki ilian kunlaboron; kaj ankaŭ la apogon de la estraro de HEF, kiu ĉiel subtenis la projekton kaj fidis nin kiam ĝi estis nur nebula ideo).

# Ĉu ankaŭ mi povas kunlabori?

**Kompreneble, jes!**

Tiel ampleksa projekto realigeblas nur per kunlaboro:

kunlaboro ja estas ĝia esenco!

# Nu, kion mi faru…?

Kontaktu la kunordigantojn de la projekto:

Miguel Ángel Sancho (esperanto@esperanto.es)
Ana Manero (biblioteko@esperanto.es)

**Kaj diru en kiu tasko vi povus kunlabori.**

## Finaj rimarkoj

- Bonvenas ĉiaj sugestoj kiuj iel [illegible]
- [illegible] malgrandan.
- Kunlaborantoj povos ĉiam kalkuli je [illegible]

**El malgrandaj akveroj fariĝas granda rivero.**

**(Esperanta proverbaro)**

# Vi povas kunkonstrui Bitotekon!

Koran dankon pro via atento.

Ana Manero
Biblioteko Juan Régulo Pérez
Hispana Esperanto-Federacio
http://bitoteko.esperanto.es
biblioteko@esperanto.es